# Voĉo el Bona Espero

Bona Espero, 16-11-97

Karaj membroj de la Societo Bona Espero en Eŭropo,

pro diversaj cirkonstancoj vi restis sen rektaj novaĵoj pri nia laboro dum la lastaj monatoj kaj sekve ni volonte ĝisdatigas vin pri la diversaj okazintaĵoj.

Por la eventualaj novaj membroj de la Societo, ni dezirus koncize redifini la bazan filozofion de la 40-jara ekzisto kaj rezisto-kapablo, eĉ en la plej malfacilaj kondiĉoj, de nia Institucio: doni al la homoj, kiuj rilatas al nia laboro, la "bonan esperon",ke solidareco ekzistas.

Kaj tio konkretiĝas jene :

1) Intensiva ( ne grand-skala) prilaboro de la tero por atingi ian gradon de memsufiĉo, ĉefe per daŭra plantado de frukt-arboj, ĉiam konsiderante la ekologian aspekton de la medio ;

2) Socia agado per akcepto, zorgado, edukado kaj instruado de infanoj kaj adoleskantoj,kiuj bezonas nian helpon ;

3) Mult-faceta Esperanto-agado, paralele al la agrikultura kaj socia laboroj.

Pro absoluta manko de registara subvencio dum la lastaj tri jaroj, por vivteni la gelernantojn de nia internulejo ni klopodis plialtigi la produktadon de ĉiuspecaj legomoj: manjoko, tomatoj, brasikoj,spinacoj, kukurboj,kukumoj,rafanoj kaj maizo. Daŭre ni plantadas fruktoarbojn por mangoj, oranĝoj, citronoj, gujavoj, papajoj, ktp.

Post malfacila seka sezono, feliĉe naskiĝis 4 bovidoj al kiuj ni "ŝtelas" parton de la patrina lakto por produkti diverstipajn fromaĝojn.

Ankaŭ niaj ĉevaloj normale reproduktiĝas kaj helpas transporti la bovinan sterkon al la legomejo.

<u>SOCIA AGADO</u> : La estraro de Bona Espero ĉiam pli devas dediĉi sian energion kaj zorgon al la jam kreskintaj "gefiloj", kiuj ja estas adoltoj, volas sian socian liberecon sed, de tempo al tempo, bezonas konsolon kaj konsilon de la bonespera familio.La geinstruistoj sin dediĉas al ili, ne nur kun sincera amo kaj plezuro, sed eĉ kun ioma orgojlo, ĉar finfine tiuj gejunuloj bonege profitis la ŝancon de la destino kaj marŝas kuraĝe sur la propran vivo-vojon.

Kiel lastan sukceson, ni povas konstati ke, ek de kiam Brigida vivas kaj studas en Brasilia, kune kun sia frato Clarimundo kaj João Cleberson, ŝi denove fariĝis ridetanta kaj feliĉa junulino, post trijara pilgrimado tra pluraj malagrablaj aventuroj.

Andreia kaj Rosamira vivas plene la liber-respondecon de dom-posedantino. Ili studas en por-instruista lernejo en Alto Paraiso kaj kelkfoje pasigas semajn-finon en Bona Espero, kie hejmecaj sentoj ne mankas.

Amanda flugis malproksimen al Germanio, por koni la mondon kaj vidi aliajn landojn. Nenio pli taŭga ol vivi en kondiĉo "au-pair" antaŭ ol eniri universitaton venontjare. Tion faras miloj da gejunuloj en la tuta mondo kaj ĉiujare en Bona Espero iuj aperas, kiel Katja el Hamburgo kaj Petra el Homberg.

Ursula kaj Alini kun sukceso finos la ĉijaran studadon kaj atendas senpacience la funkciadon de nia nova sidejo en Alto Paraiso por povi tie tranokti dum la semajno.

Fatima studas kaj laboras en Formosa. Ofte ni kontaktas ŝin telefone.

Maria daŭre laboras en la antaŭĉambro de la urbestro:konfida posteno.

Antonio Miguel estas policano en apuda urbo kaj vizitas nin kelkfoje. La kompleta listo estus tro longa, sed sciu, ke Bona Espero estas ĉiam la hejmo de tiuj,kiuj jam vivis tie.

Laste, Adarci deziris provi la liberecon de memstareco kaj transloĝiĝis al Alto Paraiso kie ŝi vivas en sia domo kaj instruas en la loka lernejo.

Kvankam ŝi kaj ŝia kompetenta respondeca kunlaboro mankas multe al Bona Espero, ni volonte konsentis pri ŝia decido, por ke ŝi havu pro= pran vivon post tiom da jaroj de kompleta sindediĉo al nia Instituċio.

Ĉijare ni akceptis multajn novajn lernantojn,kiuj, post la unuaj monatoj de kunvivado, bone adaptiĝis. Ni estas ankaŭ bonŝancaj rilate volontulojn, kiuj entute estis ok kaj aktive kaj harmonie kunlaboris.

La plej multaj venis el Germanio: Eva Wittig, Katrin Bormann,Andrea kaj Stefan Hanmann, Uta Bergmann, Petra Krock, Vitalij Podobedow el Murmanks ( Rusio) kaj Ewa Neuhaus el Washington (Usono).

Sonia Hey plenumis unujaran provperiodon kaj nun fariĝis plenrajta bonesperanino. Kiel diplomita pedagogo, ŝi jam transprenis la kunordigon de nia lernejo.

El Alto Paraiso venas por instrui alterne Marcia kaj Gabriela.

Nuntempe nur Iloni estas salajrata instruistino kaj pro tio la perspek= tivoj por la lerno-jaro 1998 ne estas tro favoraj.

BONA ESPERO 40-jara : Post la inaŭguraj vortoj de nia ĝenerala direktoro, dum solenaĵo en nia lernejo la 26an de julio, la nova urbestro de Alto Paraiso prenis la parolon por omaĝi al plej malnova filantropia Instituċio de nia regiono :

" Mi estis junulo, kiam sinjoro Arthur Vellozo kun siaj esperantistoj fondis vian komunumon en 1957, kaj ofte mi vagadis ĉevale sur ĉi-tiu grundo, kie nun staras bela lernejo kaj helaj infan-domoj. Miajn gratulojn!

Neniam mi pensis iĝi urbestro, neniam mi imagis hodiaŭ omaĝi al vi ĉiuj, instruistoj, edukistoj, lernantoj kaj ekslernantoj. Ĉi tiu valora laboro por nia regiono meritas nian sinceran rekonon."

Sekvis riĉa akcepto, kies bongustajn manĝaĵojn alportis la 120 invi= titoj. Ĉeestis ankaŭ Andreo Diniz, unua infano kiu naskiĝis en Bona Espero, filo de du fondintoj,en 1959. La patrino Elisabeth Poincaré mortis tuj post lia naskiĝo, sed la patro ankoraŭ vivas, kvankam tre malsana, en la nordoriento de Brazilo. Dum la solenaĵo, la fondintino Inês Nunes Machado faris memorindan prelegon pri historiaj faktoj kaj pri ĝi ni havas video-bendon.

URBA SIDEJO DE BONA ESPERO : Per urba dekreto de la 14a/11/95, la ĉefa avenuo de la kvartalo Novo Horizonte de Alto Paraiso ricevis la nomon ESPERANTO. Nia nova domo tie,estis inaŭgurita la 1-an de novembro per tagmanĝo oferdonita de la Asocio de la civitanoj de tiu kvartalo.

Antaŭ ĉ. 150 personoj, la urbestro kaj la regiona juĝistino alparolis la publikon per laŭdaj vortoj pri la senĉesa socia agado de nia Instituċio kaj pri tiu nova iniciato helpi al gejunuloj el la kamparo, kiuj deziras daŭrigi la studadon en la urbo.

Kvankam la domo ne estas ankoraŭ tute preta, jam okazis en ĝi kelkaj kunvenoj, dum ni daŭrigas la laborojn.

Grandan financan helpon por aĉeti la konstru-materialojn donis la aŭstralia kaj brita ambasadoj. Rimarkinda estas la konstato, ke du anglalingvaj registaroj subtenas .....Esperanto-projekton !

Kiam la aŭstralia ambasadoro persone vizitis nin por transdoni ĉekon de 3.300 dolaroj, li estis ravita pri nia laboro kaj kun simpatio memoris la tempon, antaŭ 30 jaroj, kiam li estis la persona sekretario de nia fama Ralph Harry. Post tiu vizito en Bona Espero, li fariĝis nia "ambasa= doro" ĉe sia brita kolego,kiu ankaŭ donis signifan kontribuon al nia projekto.

ALTA TENSIO EN NIA PARADIZO: En la kuirejo nuntempe la kukojn preparas elektra bat-miksilo, en la fridujo ni povas konservi racie nian lakton, en la kongelujo estas bonaj rezervoj de manĝaĵoj kaj video-bendojn ni povas nun prezenti laŭnecese, senzorge,ĉu la suno ŝargis la bateriojn aŭ ne

Sed la plej bela aspekto estas vespere la eksteraj lampoj laŭvoje

inter la domoj. Neniu plu devas timi noktajn serpentojn,ĉar oni vidas klare la vojon. Ankoraŭ mankas la elektraj instalaĵoj en la lernejo kaj en kelkaj dormo-ĉambroj ~~de la~~ de la infanoj. Por pli racia disdivido de la hejmaj taskoj, ni translokigis la laborejon kaj en ĝia loko funkcias nun kuirejo kaj manĝejo.

ESPERANTO-AKTIVECOJ : Daŭre kreskas la intereso pri la Esperanto-aspekto de nia laboro. Lastatempe du televidaj stacioj dissendis favoran raporton pri nia ĉiutaga vivo. Jam dufoje venis grupo de 30 studentoj de la fakultato pri lingvoj kaj literaturo de urbo Porangatu (norde de Goiás) kun kelkaj profesoroj por partopreni seminarion pri Esperanto. Ili kunportis siajn tendojn kaj kompletan kuirejan ekipaĵon kun koncerna kuiristino.

Hazarde, dum unu el tiuj vizitoj, gastis ĉe ni 8 diplomatoj kaj funkciuloj de la rusa ambasado por viziti nian rusan volontulon Vitalij.

La studentoj povis spekti spektaklon de rusa muziko kaj dancoj !

El la Federacia Universitato de Goiania venas regule studentoj pri ĵurnalismo kun sia profesoro por realigi tute specialan projekton.

Kiel diplomigan taskon ili faras filmon kun niaj infanoj.

En Alto Paraiso okazis en oktobro kongreso kun kelkcento da partoprenantoj, kie niaj gelernantoj sin prezentis kaj ni prelegis pri la signifo de la internacia lingvo por la estonteco.

En la ĉefurbo Brasilia ekzistas leĝo por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Jam anonciĝis grupo de la plej bonaj premiitaj lernantoj el tiuj lingvo-kursoj por inter-amikiĝi kun niaj Esperanto-parolantaj infanoj.

Ni devas konstati,ke nur informadi pri Esperanto malpli efikas ol ligi la lingvon al iu konkreta, interesa agado, kiel ekzemple nia eduka laboro en natura medio, farita per grupo de volontuloj el diversaj landoj.

Karaj membroj de la Societo, ĉi tiuj estas niaj lastaj informoj.

Ni denove dankas sincere kaj kore pro via fidela subtenado, kiu estas esenca por la vivo de la infanoj kaj ni petas vin daŭrigi vian helpon, ĉar sen ĝi ni devos haltigi grandan parton de nia laboro, atendante ke la brazila socia-politiko ŝanĝiĝu!

Ni profitas la okazon por sendi al vi plej korajn jarfinajn bondezirojn, nome de ĉiuj ,kiuj vivas kaj laboras en Bona Espero.

---

Bildoj:

1) Dum la solenaĵo de la 40 jaroj de Bona Espero. De maldekstre : Francisco Szerwinski ,filo de la donacinto de la unua grundo ; Jair Barbosa, urbestro de Alto Paraiso ; Mario Garofalo,konsilanto; Inês Nunes Machado, fondintino kun la edzo ; la edzino de la urbestro; Carlos Lima Melo, eks-direktoro; Adilia Pereira dos Santos, unua lernantino en 1959.
2) Dum sia vizito, la ambasadoro de Aŭstralio interparolas kun la infanoj de Bona Espero, post ilia arta prezentado;
3) En Bona Espero neniam mankas okazo por festi dum naskiĝtaga datreveno ;
4) La urbestro de Alto Paraiso (staranta en la mezo) parolas dum la inaŭguro de la urba sidejo de Bona Espero. Maldekstre de li la juĝistino.